

HISPANA ESPERANTO

Ilustrita ĉiunonata gazeto, aldono al HISPANA ESPERANTO-BIBLIOTEKO
senpaga por ĝiaj abonantoj. Adreso: Julio Mangada Rosenörn. — Glorieta
de Bilbao, 5, MADRID

NUM. 8. — AUGUSTO-SEPTEMBRO 1928



El Plafono de l'ĉefsalono de la Urbodomo. — Sevilla

PRI LA XX UNIVERSALA KONGRESO

Ĝi ĝenerale bone aranĝita, bonege kontentigis la samideanaron, proksimume 1.500 esperantistojn el 40 nacioj, kiuj povis ĝui la multenombrajn kaj gravajn koncertojn, la mirinde luditan «Hamleto'n», la Muzeojn, la monumentojn, la tre interesan Zoologian Ĝardenon, la grandiozan havenon kaj la allogantan simpatie de Antverpeno, kiu estis en tute al ni kvazaŭ vera Paradizo, en kiu ludis rolon de sindonemaj, feliĉigaj Evo kaj Adamo la tre simpatiaj geedzoj Schoofs. La antverpenaj samideanoj, kiuj, sub prezido de la tre simpatia Van Schoor, organizis la XX^{an}, meritas gratulojn ĉies.

Vendredon, 3^{an} de aŭgusto, je la mateno, mi kuniĝis al polaj gesamideanoj kaj vizitis la Zoologian Ĝardenon kaj altiris mian atenton akvologanta besteto drakforma, naĝanta vertikale per naĝiloj vere kvazaŭ flugiletoj, kaj kies korpeto, fojojn, ofte, kurbigis laŭ demandanta signo, kaj mi ĉi tiun atentis kaŭze de antaŭkongresaj okazintaĵoj, dirante al mi: «Jen! Kio okazos?» Sed kvankam kaptite de tiu ĉi demando, mi fine alvenis al loko, kie la brilaj belkoloroj de la plumaroj de papagoj kaj de aliaj tropikaj birdoj forflugigis de mi la pesimismon kaŭze de la kvazaŭ vivanta demandsigno, antaŭvidante per la belaj koloroj belan horizonton al nia afero; kaj efektive tiel okazis: de la esperanta vidpunkto, minacis la Kongreson io neagrable, kaŭze de sopiro al plej bona tutmonda organizo de nia movado; sed feliĉe, spite de ĉio, regate de bondeziro kaj konkordo, la esperantaj aferoj disvolvigadis kontentige antaŭvidigante progreson de nia komuna celo kaj firman unuiĝon de la esperanto-movado. De la tre agrable kaj amuzanta Interkonatiga Vespero, dum kiu la muzikistaro de la Antverpena Policistaro ludis belegan koncerton, la Grupo «La Verda Stelo» de Antverpeno donacis riĉan kaj belan standardon al la Esperantista Polica Grupo kaj fine dancadis la gesamideanoj, en la ferman kunsidon, plena *zamenhofaneco* regis, ĉu ĉe ĝeneralaj kunsidoj, ĉu ĉe la kunsidoj de la Ĝenerala Estraro de la Esperanto-Movado, elektinte la simpatian altŝatatan kaj kompetentan S-ron Merchant (el Anglujo) Prezidanto de la I. C. K. kaj reelektinte S-ron Rollet de l'Isle kaj S-inon Isbrucker kaj aklaminte D-ron. Privat Prezidanto de U. E. A.; ĉu ĉe fakaj kunsidoj, ĉu ĉe tiu de la Lingvo-Komitato.

Tial ke Antverpeno estas unu el plej gravaj havenoj de la Mondo, la Somera Universitato koncernis nur «La Maron kaj Navigacion» de ĉiuj vidpunktoj, jura, civiliza, vivkondiĉa, k. t. p. Mi konstatis manko de publiko por tiuj prelegoj, kiujn mi parte povis aŭskulti kaj mi konsciis, ke estis tiel multenombraj la oficialaj kunsidoj pri la Esperanta Movado, ĉefa celo de niaj Kongresoj, kune kun la fakaj, ankaŭ tre gravaj por nia celo, ke la Kongresanaro ne povis ĉeesti la prelegojn sufiĉe nombre. Kaj atentante ankaŭ, ke la samideanaro ŝategas la konstantan interrilatiĝadon, ke ĉiu profitas la mallongedaŭran tempon de la Kongreso por iri, kiel papilio de floro en floron, de rondo en rondon, de fratoj en fratojn, vivadante ĉe Esperantujo, oni devas sperti por pli malgranda nombro da prelegoj, kiuj devas esti, kvankam gravaj, tre allogaj kaj vulgarigantaj.

Bedaŭrinde mi ne povis ĉeesti la hebrean Diservon, sed jes la katolikan kaj la protestantan: post la katolika meso, nia sampatrujano Pastro J. Front Giralt el Gerona, elokvente, klare, aŭdigeble, predikis pri «Amu unu la alian, kiel mi vin amis», dirante ke nuntempe okazas same kiel kiam la Doktrino de Jesuo savis la homojn el reciproka malamo eĉ ĉe la familio mem, pro kio pere de Esperanto ni divastigu la savilon. La protestanta estis, oni povas juĝi, racia Diservo konsistanta el predikado interrompita dufoje de dialogoj kaj kantoj: Pastro Jonje, el Bergen-op-Zoom, tre elokvente kaj klare temis sin bazante sur la «Preĝo sub la verda standardo» per profundaj klaraj pensoj tiel neŭtrale esprimitaj, ke la Diservon povis akcepti diversreligiaj samideanoj; la pastro sin turnis respektive al frato kaj fratino per demandoj responditaj de samideano kaj samideanino dum la interrompoj, kaj la plimulto el la ĉeestantoj kantis, akompanate de orgeno, belajn sentigajn kantojn, el ili «Preĝo sub la verda standardo» kun muziko malsama je tiu de la himno de nia nacia Asocio. Vere ĉi tiu Diservo mirigis la neprotestantajn samideanojn, kiuj ĝin ĉeestis.

Impona kaj impresiga estis la esperanto-manifestacio tra Antverpeno al la Urbodomo, kie la Urbestro, sub prezido de la Urbestro, akceptis sindoneme la esperantistaron reprezentatan de la oficialaj direktoroj de la Esperanto-Movado, de naciaj delegitoj, k. t. p.

Konstatinde estas la premio gajnita de samlandanino nia pro ŝia kostumo; tute same devas kontentigi nin, hispanojn, la fakto, ke, proponinte fari filmojn pri niaj Kongresoj, nuntempe neeble, oni konstatis,

ke, ĝis nun, nur la Hispana Esperanto-Asocio povas prezenti esperantan filmon, kaj tial la iniciativo praktike apartenas al ni; ankaŭ apartenas al ni iniciativoj pri monhelpo al la Akademio kaj pri tutmonda esperanto-organizo sur la bazo de individuo kaj unuiĝo de kotizoj, kaj ĉi tiu iniciativo estos-entreprenota baldaŭ sub tre favoraj aŭspicioj. Ne laciĝu laborante! Hispaninoj preparu vin por gajni premion ĉeestante Kongresojn, kiel gajnis F-ino Maria Salinero el Badajoz.

LA ILUZIOJ

Oni diras *supre* kaj *sube*. Por ni *sube* estas en la centro de la Tero, kaj *supre* en kontraŭan direkton: la Tero estas *suben* kaj Venuso *supren* por terloĝanto, male por venusano. Eĉ ne elirante de nia planedo, la loĝanto de Nova Zelando indikos *supren* tute male de hispano. Kaj en la interplanedaj spacoj ne estas *supre*, ne estas *sube*.


Oni parolas pri *tago* kaj *nokto*. *Tago* estas por homo ĉe la parto de la Tero lumigata de la Suno; *nokto* por tiu, kiu estas en la kontraŭa terparto. Sed se ni povus eliri el la planedo, ĉiam estus *tago* por ni, metante nian vizaĝon al la Suno, sed por nia dorso estus *nokto*.

Ni parolas pri *Oriento* kaj *Okcidento*. *Oriento* estas la loko de kie la Suno ekvidiĝas; *Okcidento* estas la loko en kiu la Suno kuŝiĝas. Sed en la interplanedaj spacoj, kie ĉiam lumas la Suno, ne estas *Oriento* kaj *Okcidento*.

Tute same okazas pri *Nordo* kaj *Sudo*. *Nordo* estas la plilongigo de unu el du ekstremoj de la tera akso, kaj *sudo* la plilongigo de la alia kstremo, Sed, kian intereson povas havi pri la terakso aŭ pri akso de alia mondo el milionoj da mondoj iu, ne loĝante en nia planedo, aŭ en iu ajn mondo?

Oni parolas pri *dekstra* aŭ *maldekstra* flanko, pri *antaŭa* aŭ *posta* parto; sed ĉio estas rilate al nia korpo. Se ni povus nin apartigi el nia korpo same kiel ni demetas niajn vestojn, kaj konservi nian konscion, ne estus al ni *dekstra* aŭ *maldekstra*, *antaŭa* aŭ *posta*, k. c., konceptoj. La spiritoj ĉion havas antaŭ si same, kiel la Suno havas ĉion.

Por terloĝanto estas *tago* kaj *nokto*, *vintro* kaj *somero*, *nordo* kaj *sudo*, k. c., sed por spirito ĉe la interplanedaj spacoj nenio el tio ekzistas. Ĉio aludita estas relativaj terminoj kaj iluzio de la sentoj, kiel



Granda altaro Katedralo.—Sevilla.

estas la *varmo* kaj la *malvarmo*, la *sono* kaj la *silento*, la *lumo* kaj la *malheleco*.

Tute same okazas ĉe la mondo de la ideoj: la sklaveco estas *malbono* por la hodiaŭa civilizita homo, sed antaŭ kelkaj jarcentoj estis *bono*, ĉar dank'al ĝi oni ne buĉadis la militkaptitojn.

Se la Homoj ne donus absolutan valoron al la propraj ideoj, ili ne estus tiel fanatikaj, ili respektus tiujn de la kontraŭulo, kaj ili tiel evitus multajn malamojn kaj sangverŝantajn luktadojn, multajn politikajn kaj religiajn persekutojn, ĉar ili estus toleremaj.

Malklerulo konsideras, kiel centron de la Universo, ne nur la planedon sur kiu li loĝas, sed eĉ sian propran MION, kaj li volas trudi sian opinion al la ceteraj, ne konsiante ke plej ofte lia opinio devenas de la iluzio de liaj propraj sentoj.

Unu el ĉefaj taskoj de la Homo estas komprenigi, ke ĉiu el ni ne estas pli grava ol la ceteraj, sed ke ni estas eroj el ĉeno, pli bone el reto, kies limojn ĉe la tempo kaj la spaco ni ne konas. Kaj por kompreni ĉi tiun ideon estas necese eviti, ke la iluzioj de la sentoj trompu nin. Nur tiel oni povas esti tolerema, kaj la toleremo estas virto de civilizoj, taj Homoj kaj Popoloj.

Fernando Redondo

LA PLEJ ANTIKVA HOMA SKELETO DE HISPANUJO

LAŬ

D-RO JESUO CARBALLO

Direktoro de la Prahistoria Muzeo de Santander

Mi parolas pri la plej antikva homa skeleto de Hispanujo koncernante kompletan skeleton; ĉar ekzistas fosiliaj skeletrestaĵoj pli antikvaj, ekzemple: makzelo, kiun oni trovis en *Bañolas*, kaj kripligita aŭ difektita kranio, kiun oni trovis en *Gibraltar*, kaj kiuj estas el la plej konataj de la Sciencistoj.

La homa fosilio, kiun mi eltrovis en *Colombres* (Asturias), aperis kompleta, ĉe ankaŭ kompleta kaj primitiva tombo, kune kun aliaĵoj.

Tiel, do, la eltrovo havas ĉiajn garantiojn postulatajn de la scienco, La tombo estis ne ĉe groto, sed ŝirmata de kalka roktranĉaĵo apud la rivero *Cabra* proksime de la marbordo nomata *Franca*; kaj la skeleto kuŝis dorsen, orientigite de Oriento en Okcidenton. Eligante la tertabolojn atenteme laŭ surmetada ordo, ni trovis la kranion plena je tero kaj la makzeloj larĝe malfermataj. Turninte la skeleton dekstreflanken, ni rimarkis ĉe la maldekstra tempio tute klare truon de la trepanado; kaj, ĉar la osta bordo de la trepanadtruo ne estis refariĝanta, ni konkludis, ke la ĥirurgia operacio estis farita malmulte da tempo antaŭ ol li mortis, aŭ ke la morto estis kaŭze de la operacio. La ripoj kaj longaj ostoj estis unu apud la aliaj laŭ la natura loko ĉe kie ili devis kuŝi pro situacio de la korpo, ĉar ĉiam la terpremado, kiam detruigis la organaj ligiloj, apartigas pli malpli la erojn de la skeleto. Kiel estas dirite, skeleton kaj ilojn kovris tombo el plej primitivaj, konsistante el liberaj ŝtonoj kaj tero.

Apud la kapo kuŝis tri ŝtoniloj el tiuj nomataj «*picos asturienses*» (*ĥakioj de Asturias*), kiujn la indiĝenoj de ĉi tiu hispana regiono uzis por detranĉi de la maraj rokoj la moluskojn altenatajn al tiuj rokoj, laŭ la grafo de *Vega del Sella*, kiu estas la plej kompetenta prahistoriisto de Hispanujo pri ĉi tio. Ĉi tiu neolitejo, kiel aliaj samaj, apartenas al la meza periodo el la neolita, ĝi estis pli antikva ol la metaloj, la ceramiko kaj la poluritaj ĥakiloj.

Kun mi kunlaboradis medicina D-ro Alvarez Nava, kaj li min helpis efike por la antropologia studo, kaj kvankam ni ne povis fari tute perfekte la kraniajn mezurojn, ni konkludis aparteni la kranio al la raso Cro-Magnon.

Estas rimarkinde konstati ke la trepanado kaj enterigo en tombo estas praktikoj de la lasta periodo, de la tria periodo, de tiu epoko, en Francujo; ĉi tie neniam oni trovis ilin apartenantaj al plej fruaj periodoj. Tute male ĉe la Kantabra hispana marbordo, kaj ĉi tio elpruas ke tiu kulturo ĉu naskiĝis en Hispanujo aŭ de ĉi tie aliris al Francujo; kaj same okazas pri aliaj plej antikvaj kulturoj. Tial prave oni povas konkludi, ke Hispanujo estas potenca deirejo aŭ fokuso de civilizacioj al la eŭropa Kontinento de la plej antikvaj tempoj.

PER FIDELECO KAJ KONSTANTEKO ESPERANTISTOJ TRIUMFOS

Jen io, kion devas koni la samideanoj por konstati, ke Esperanto iras antaŭen sukcese, kaj ke nur malkonformuloj, fieruloj kaj nepraktikuloj iras de lingvoprojekto en lingvoprojekton perdante tempon, sed neniel barante Esperanto-iron. S-ro G. Bohin, kiu estis unue esperantisto, kaj due idisto, pro mortkrizo de Ido, fariĝis ĵus Occidentalisto, kaj iam eble Orientalisto aŭ Afrikisto, tio estas, ĉiam sistema kontraŭulo, ne volas vidi, ne volas aŭdi; tial li ne konscias, ke Esperanto estas tre praktika lingvo, kiu, kvankam ne tute perfekta, plenumas bonege sian taskon por ĉia interkompreniĝo; male okazus, se ni ne estus firme fidelaj al la Fundamento, kaj ni akceptus la reformojn por fali en ĥaoson; ne, tute ne, ni restu firmaj Fundamentuloj por ke la mirinda lingvo de Zamenhof utilu al la Homaro same, kiel li konsciis kaj volis; spite de ĉio kaj kontraŭ ĉiuj reformemuloj alten ni tenu nian standardon, varme ni agu, fervore kaj lojale sekvu la vojon, kiun montris al ni la Majstro, ĉar ĉi tiu vojo estas kondukanta nin al certa triumfo, S-ro. G. Bohin, eminenta idisto antaŭ nemulte, diras per letero, el kiu la gazeto «La Rejna Stelo» tradukas, la jenon:

«... Mi opinias, ke verŝajne la esperantista ĵurnalaro sciigis siajn legantojn pri la subita kaj fortega krizo, kiu kvazaŭ finigis la idistan movadon en la daŭro da kelkaj monatoj. Nune, kiuj restas el la anoj, kaj el la organizaĵoj, ĵurnaloj, k. t. p. estas dividataj en tri partoj:

- 1.e Tiuj, kiuj alprenis Occidental'on (Linguo Internaciona. Praha).
- 2.e Tiuj, kiuj volas aliĝi Idon laŭ la modelo de Occidental Mondo. (Stockholm);
- 3.e Tiuj, kiuj ne akceptas ian ŝanĝon (Ido. Zürich).

Ĉar la idista movado jam estis malforta kompare al la esperantista, estas nedubeble, ke neniam ĝi povos restariĝi, kaj ke fine la idistoj estas, ĉu definitive alprenontaj Occidental'on, ĉu reprenontaj Esperanton.

De post septembro, kiam mi sciigis pri la graveco de la krizo, mi priensis pri la elekto, kiun mi devas fari. Serioze pripensinte, mi decidis aliri al Occidental', kiu nun, post la malsukceso de Ido, estas la inter-

nacia lingvo la plej perfekta, la plej taŭga por fariĝi, ne nur *helpa lingvo*, kiel oni volis fari por Esperanto aŭ Ido, sed *eŭropa lingvo*, superante la naciajn lingvojn kaj ilin allasigante al la statoj de dialektoj, same kiel la «hochdeutsch» de Luther superis la malsamajn germanajn linvojn, nun falintaj al la stato de kamparaj dialektoj...»

Konsciu, karaj samideanoj, la seriozecon de S-ro G. Bohin pripensante al kiu lingvo aliri, ĉu al lingvo vivanta de vivanta tutmonda popolo, ĉu al nova lingvo, kiu eble estos lingvo de eŭropa mondo; kaj mi demandas: ĉu S-ro Bohin ŝercis? ĉar se oni demandas al infano ĉu li preferas birdon en mano, aŭ ĉasotan birdon, certe serioze la infano preferos la unuan, des pli se li konsciis, ke la unua estas pli potenca, ĉar per siaj flugiloj atingas tutan mondon. Esperanto riskas nenion restante ni tute fidelaj al la Fundamento kaj agante fervore, nelacigeble, kiel ni kutimas, kaj kiam ni aŭdu pri alia lingvoprojekto, ni ne atentu pri ĝi, ni atentu la ĉiufoje pli grandan sukceson de nia kara lingvo, kiu iom post iom, firme, antaŭenpaŝas.

Atentu, ke estas kutime ofte paroli sur la ĵurnaloj nezorgeme pri aĵoj nekonataj de la ĵurnalistoj, kaj aperigi telegramojn tute same neatenteme pri ilia enhavo; tiel okazis al la ĵurnalo «A B C» de Madrido, aperigante telegramon de la 15^a de la pasinta februaro senditan el Vieno, pri «Occidental» «nova universala idioma». La telegramo diras, he ĉi tiu lingvo eble estos oficiala de la paneŭropa movado, ke ĝia bazo estas latina, ke ĝi estas multe pli facila kaj perfekta (!), ol Esperanto kaj Ido, ke iuj esperantistoj, kiel Teo Jung, direktoro de *Heroldo de Esperanto*, kaj la estro de la hungaraj esperantistoj, S-ro Agustin Marich konfirmas la superecon de «Occidental». Ridindega estas la asertoj de la telegramo, kies teksto mem pravas la vivoforto de ĉi tiu lingvo, *kiu de post tridek jaroj* JAM KALKULAS UNU MONOTAN GAZETON, *Cosmoglotta*. Tiel ridindega estas la rimarko de A B C, dirante, ke la universala lingvo devas esti LATINO, tial ke estas multenombraj majstraj verkoj literaturaj, filozofiaj, sciencaj, artaj, k. c., en latina lingvo. La argumento estas tute sama, kia estas tia de kamparano, kiu, ĉar la prapatroj veturis per ĉaro, ne volis veturi per vagonaro: la moderna vivo postulas komunan lingvon, facile lerneblan por kiu ajn homo el kiu ajn lingvo kaj raso, kaj ĉi tion elpruvis Esperanto en la Orientaj landoj, super ĉio en Japanujo, kie la progreso de nia lingvo estas tre rimarkinda, ĉar, laŭ opinioj de

japanoj, al kiuj mi demandis, ili bezonas ses jarojn por lerni la, por ili, plej facilan eŭropan lingvon, anglan lingvon, kaj DU JAROJN maksimume por lerni Esperanton, kiu nun post kvardek jaroj estas vivanta lingvo de vivanta tutmonda popolo. Fideleco al la Fundamento kaj konstanta agemeco estas niaj devoj; spite de la UNU ĈIUMONATA GAZETO «KOSMOGLOTTA», ni triumfos!

J. M. R.


RECENZEJO

«Luno de Izrael». Verkita de la mondkonata H. Rider Haggard, tradukita de E. S. Payson kaj M. C. Butler; 230 paĝoj 12 × 18 cm. Prezo: broŝurita 3 ŝilingojn 6 p., bindita 5 ŝ.; afranko respektiva 4 kaj 5 p.

La plej bona laŭdo al libro estas diri: oni ne povas ĝin delasi de la manoj kaj de sub la rigardo, ĉar tiamaniere katenigas alloge la atenton, ke la leganto enprofundiĝas pli kaj pli plenghoje en la argumenton kaj la deziro malpermesas interrompi la legadon, kaj jen ĉi tio okaze de «Luno de Izrael», kies argumento disvolviĝadas konstante plena je intereso per flua kaj bonstila Esperanto. Ĉi tiu novelo estas rekomendinda de ĉiuj vidpunktoj same, kiel «La Faraono»; kiel ĉi tiu, ĝi ankaŭ parolas al ni pri Egiptujo kaj Faraonoj dum tempo de la plagoj kaj eliro el Egiptujo de la izraela popolo. Aperu de iuj vortoj ne oficialaj ankoraŭ, ne estas kritikinda; nur mi ne aprobas forgeson de la sufiksoj *ig* kaj *iĝ* en iuj okazoj, ĉar se ni tion ĉi ŝatus, ni malaperigus ĉi tiujn du gravajn elementojn de nia lingvo.

Havebla ĉe B. E. A., 142 High Holborn. London, W. C. 1.

«Ĉu estas ebla kaj necesa Internacia Helplingvo». Prelego de D-ro Ivan D. Ŝiŝmanov, tradukita el la bulgara lingvo de Atanas D. Atanasov. Broŝureto 28 paĝoj. 12 × 15 cm.; prezo 0,50 sv. fr. Havebla ĉe Agentejo «Pelikan», str Alabinska, 19-Sofio-Bulgarujo. La aŭtoro, kiu sisteme atakis Esperanton, koninte la lingvon, fariĝis fervora partiano. La tradukinto uzas vortojn («lokal», «spekulaĵoj», «interveno», «utilitarismo», «genro», k. c.) kiuj ne estas korektaj; ankaŭ esprimmanierojn, kiujn mi ne ŝatas e: (paĝo 16^a) «ke kiam ajn kuniĝus ĉiuj lingvoj en



Krado de la ĉefkapelo-Katedralo.—Sevilla.

unu sola »anstataŭ« ke iam la lingvoj fariĝos unu sola»; iujn prepoziciojn ne tute ĝuste.

«Esperanto. 500 Komercaj Frazoj», de Robert Kreuzer, L. K. Broŝuro 32 paĝo; 12½ × 18 cm. Prezo: 1 sv. fr. Havebla ĉe Verlag von Wilhelm Violet. Stuttgart (Germanujo). La kompetenteco de la aŭtoro pri ĉi tiuj aferoj estas sufiĉa garantio por rekomendi la broŝuron li tre ĝuste elektis kaj konstruis la frazarojn por la diversaj pritraktitaj komercaj temoj.

«La Granda Leĝo», II^a kajero de la Biblioteko «Nova Kulturo», abonebla po 3 sv. fr. jare ĉe Atanas Nikolov, str-Car 10 Ŝiŝman, 19, Burgas (Bulgarejo). Pritraktas la doktrinon de la bulgara moralgvidanto Petro Danov.

LA HISPANA REGISTARO HONORAS ESPERANTISTON

Ĝus la Hispana Registaro decidis honori kaj premii la esperantan laboron de nia fervorega samideano de Cheste, S-ro Francisco Mañez, per la ordeno «Bronza Labormedalo». Kial? Jen: Mañez ne laciĝas ĉiutage de krepusko al krepusko kulturi la grundon, kaj reveninte en la urbon, tuj li entreprenas siajn esperanto-kursojn de antaŭ multaj jaroj, eĉ, dimanĉojn, li piediras ĉu al iu proksima vilaĝo, ĉu al alia loko, por lernigi Esperanton al Instruistoj kaj Kampolaboristoj. Li partoprenis la gastigadon de aŭstriaĝ geinfanoj Krom la ordeno atingita, li meritas pro sia kultura agado la ordenon de «Alfonso XII^a», pro sia penado al la geinfanoj de Aŭstrujo, la ordenon de la Bonfaremo. La Hispana Esperantistaro fieras pro la honoro al sia lojala nelacigebla pioniro, kies agado estas imitinda kaj li akceptu la sincerajn tutkorajn gratulojn de la Hispanaj Esperantistoj.

La Ministerlo de la Laboro sendis la komunikaĵojn al H. E. A., kies Prezidanto, S-ro Vicente Alonso, pagis el la Kaso de la Asocio, 40 pesetojn pro la Diplomo, kaj petis, ke dum nia VII^a Nacia Kongreso de Esperanto en Sevilla okazu la pendigo de la ordeno de sur la brusto de nia kara samideano Mañez, dum la solena malfermo de la Kongreso, por plej alta honoro. Edifu, karaj gesamideanoj! Imitu ĉi tiun modestan

komplaboriston, kiu, kulturinte la grundon, de krepusko al krepusko, revenas hejmen kaj klarigadas kurson post kurso, kaj festajn tagojn piediras en najbarajn vilaĝojn por lernigi Esperanton al instruistoj kaj vilaĝanoj!

VII^a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO (SEVILLA, DE LA 5.^a ĜIS LA 9.^a DE NOVEMBRO)

Estas necese, ke ĉiuj hispanoj samideanoj atentu multe la Internacian esperantistan literaturan Konkurson de nia Kongreso sub la organizado de H. E. A.

La disdonado de premioj okazos en unu el ĉefaj teatroj, laŭ brila festo kun Kortego de Amo el Reĝino kaj sekvantaro el belaj fraŭlinoj kun specialaj esperantaj kostumoj, kaj santempe, la Korteganinoj pendigos de sur laa esperantaj flagoj la broditajn rubandojn, memorigantajn ĉi tiun Kongreson.

Bonvolu alsendi vian mondonacon por altigi valoron de la premioj, ĉar la sumo atingita ĝis nun estas modesta; jen ĝi ĝis hodiaŭ:

Sumo ĝis decembro lasta.....	425,50 pt.
Profito pro la deponita sumo en la ŝparkaso ĝis fino de la dirita monato.....	2,40 »
S-ro Angel Sánchez Gómez, de Salamanca.....	2,00 »
» Julián Sosa, de Madrid.....	5,00 »
» Eduardo Cano, de Sigüenza (Guadalajara)...	5,00 »
» Amado Hernández, de Argujillo (Zamora)....	1,00 »
» Gerardo Aja Gómez, de Los Corrales (San- tander)	4,00 »
» Jaime Miro G'ene, de Barcelona.....	2,50 »
Ateneo Popular de Santander.....	15,00 »
S-ro Carlos José Tiard, de París.....	4,00 »
» Julián Romero, de Sevilla	11,00 »
En tute ĝis fino de junio de 1928.....	477,40 »

Ni esperas, de nun ĝis la dato de la Kongreso, ke ni duobligos la sumon almenaŭ. Sendu tuj vian donacon!

AL SEVILLA!... AL SEVILLA! Kie nia VII.^a Kongreso disvolvigados tre interese kaj solene; kie vi ĝuos artajn kaj naturajn belaĵojn; kie vi interkonatiĝos kun tre allogaj tipaj kutimoj, de kie vi revenos hejmen satigitaj de kontento kaj kuraĝigitaj de entuziasmo kaj fervoro al nia idealo. PROFITU LA OKAZON POR ALKURI AL SEVILLA! PROFITU LA FERVOJRABATON POR VIZITI SAMTEMPE LA PALACARON DE LA HISPANAMERIKANA EKSPozICIO!

Ĉi kune vi ricevos aliĝilojn, se vi ankoraŭ ne aliĝis, faru tion tuj, kaj bonvolu aliĝi iun el viaj amikoj almenaŭ, kaj la regionaj Delegitoj estas petataj intensigi la varbadlaboron. Jen novaj aliĝintoj.

N.º 180.—S-ro Antonio Jiménez Verger, de Villajoyosa (Alicante).

» 181.—Grupo Eoperantista «Gajeco kaj Laboro», de Tocina (Sevilla).

» 182.—S-ro Francisco Muñoz Martínez, de Los Rosales (id.).

» 183.—Fomento del Civismo, Palma de Mallorca.

» 184.—Ayuntamiento de Soller (Balears).

» 185.—Esperanta Grupo «Sollerich», Soller (id.).

» 186.—Ateneo Científico, Literario y Artístico de Mahón (id.).

» 187.—Unión de Empleados de Escritorio de Sevilla.

» 188.—S-ro Hipólito S. Luengo, de Orense.

» 189.—F-ino Rosario Rodríguez.

» 190.—F-ino Ana Mejías Román, de Córdoba.

» 191.—Centro Cultural del Ejército y de la Armada de Sevilla.

» 192.—S-ro Benito Anguiano Escolar, de La Línea (Cádiz).

» 193 — » Gabriel Alomar, de Palma de Mallorca.

» 194.— » Antonio Pérez Ruiz, de Madrid.

» 195.— » Juan Calahorra Soler, de Madrid.

» 196.—F-ino Nemesia Pérez Sánchez, de Madrid.

» 197.— » Aurora Ortega Barragán, de Sevilla.

» 198.—S-ro Francisco Guinter Santacruz, de Sevilla.

» 199.— » José Martos Martín, de Sevilla.

» 200.— » Enrique Navas Velázquez, de Sevilla.

Atentu la Grupoj kaj Asocioj celaniaj alporti siajn flagojn avizu ĉi tiun Komitaton antaŭ la 1.^a de oktobro proksima.

Same devaŝ antaŭavizi la gekongresanoj pri siaj partoprenoj al ekskursoj por plej bona aranĝo, kaj komuniki kian loĝejon deziras

indikante prezon maksimuman kian ili povas pagi por kontentigi ciujn laŭ plej granda eblo.

Per la proksima numero oni sciigos proksimume la programon kun ekskursoj kaj vizitoj de nia VII^a Kongreso.

Preparu, do, viajn valizojn al SEVILLA! Ampleksigu la bruston kiel eble plej, ĉar via koro ĝojos tiel eksterordinare en SEVILLA, ke tia ĝojo postulos ampleksan korejon; kaj esperu, ke nia Nacia Esperanto-Kongreso fervorigos tutplene vin al nia frata idealo, firmigante nian nunan kaj poresperantan Hispanan Esperanto-Asocion, ĉar nia Kongreso estos ĉiam al vi neforgesebla, kaj konstanta instigilo al nelacigebla esperanto-laboro. ALIĜU MULTENOMBRE KAJ SAME ĈEESTU POR VIDIGI KAJ ELPRUVI, KE NIA AFERO ESTAS REALAĴO MIRINDA KAJ SUBTENINDA!

Sevilla, 31.^{an} de Aŭgusto de 1928.

La Sekretario-Kasisto de la L. O. K.

Carlos Martínez

RIMARKO: Sendu ĉion al la Sekretario-kasisto de la VII^a Hispana Kongreso de Esperanto, S-ro Carlos Martínez, Rioja, 25, Sevilla.

DE LA TAGIĜO AL MORTO

La unua rozkolora lumo anoncanta la tagon estas kvazaŭ infaneco, kiu ĝoje ridas kaj alportas la amon kaj la esperon al lacigitaj esperantaj ĝin.

Same kiel la Suno alteniĝas majeste de Oriento, la infano vekigaĵas ĝoje je klaza mateno por vivadi sian unuan momenton.

Same kiel la Suno, varmegan tagon, lumigas la Teron kaj ĉi tiun rigardadas sub sia grandioza dia radifasko, la infano disdirektas sian naŭvan rigardon, celante koni kaj asimili ĉion, kio lin ĉirkaŭas.

La Suno atingas sian zeniton. Ankaŭ la infano atingas maksimumon da juneco kaj energioj.

Ŝajnas ke la Suno ĝojas dissedante lumon kaj varmon sur ĉion, kio vivas ĉe ĝia influo.

Ankaŭ la homo distriĝas kaj ĝojas disdonante sian amon, sian arton, sian sciencon, per sama sindonemo, kia estas tia de la reĝa astro.

La Suno subiras; jam ne povas sendi lumon kaj varmon. Ĉe Okcidento aperas ruĝan flamon, kiun la nuboj envolvas transformante ĝinaro el belaj koloroj, kiuj fandigas ĉe la nokto.

La Homo ankaŭ dekliniĝas kaj enprofundiĝas, kiel la Suno, en la nokton!...

Hispane verkis

Emilio G. Linera.

.....

SENDU KIEL EBLE PLEJ BALDAŭ VIAN KOTIZON POR HISPANA ESPERANTO ASOCIO. SE VI SENDUS SAMTEMPE TRI PLIAJN PESETOJN VI RICEVUS ĈI TIUN GAZETON. KAJ KIEL DONACON, LA UNUAN APERINTAN KAJERON DE «DON KIĤOTO» KAJ APERONTAJN DUM LA JARO DE TIU TUTMONDFAMA VERKO, KAJ LA HISTORIAN NOVELON EN PROZO KAJ VERSO «FERDINANDO VI^a KAJ FARINELLI». RAPIDU SENDI LA KOTIZOJN PETANTE LA LIBROJN, ĈAR LA RAJTO POR LA DONACO FINIĜOS. FREMDULOJ RAJTOS SAME, KIEL ENLANDANOJ, SENDANTE KVIN SVISAJN FRANKOJN PER POŝTĜIRO.

ENLANDANOJ sin turnu al S-ro MARIANO MOJADO, strato ABASCAL, 13, MADRID.

FREMDULOJ al S-ro JULIO MANGADA ROSENÖRN, Glorieta de Bilbao, 5, MADRID (Ĉi tiu akceptas dolaran bankvileton aŭ francajn bankbiletojn).

«DON KIĤOTO» nur havigos aparte S-ro Ludoviko Torrent (Presejo. Strato Santa Teresa, 16-Madrid), al kiu povas sin turni por mendoj interesatoj. S-ro Torrent faros rabaton, 10%, kian mendo minimume atingos 50 specimenojn; por mendo de 250, 500 kaj 1.000 specimenoj, la respektivaj rabatoj estas 20%, 30% kaj 40%. Ĉiam estas postulata antaŭpago.

PRESEJO LUDOVIKO TORRENT KAJ K^{io}
Santa Teresa, 16.-MADRID-HISPANUJO